

TABUAJ VORTOJ EN ESPERANTO



TABUAJ VORTOJ EN ESPERANTO

VORTARO KUN EKZEMPLOJ PRI PRAKTIKA UZADO

Vraca, 1991

Redaktoro: Ljubomir Trifončovski

(c) ĉe la aŭtoroj, 1991

Enkomputiligis Igor Fedorov, 1999

PDFigita de

LIGO DE SAMSEKSAMAJ GEESPERANTISTOJ - LSG (2018)

Naŭ enkondukaj frazoj

Nek Zamenhof nek la aliaj pioniroj de lingvo Internacia en siaj verkoj uzis obscenajn vortojn, kvankam ĉiuj ili klopodis fari el Esperanto realan lingvon.

Unue la tabuaj vortoj publike aperis en "Sekretaj Sonetoj" de Peter Peneter en 1931(?). Post kvardekkvinjara ekzistado Esperanto fariĝis plenrajta lingvo samkiel la naciaj.

Sed la vortaroj, kie i.a. estas tabuaj vortoj, ne multenombros. Ankoraŭ la esperantistaro hontas...

Ĝis nun la plej seriozan kontribuon por la sistemigo de la obscenaj vortoj kaj esprimoj faris Renato Corsetti per "Knedu min, sinjorino" kaj "Propono por kromvortaro".

La vortaro, kiu nun estas en viaj manoj, daŭrigas la esploron kaj pliriĝigas la tabuajn vortojn en Esperanto. La ekzemploj pravas, ke la lingvo povas esprimi ĉion, eĉ la plej intiman. Ili montras, ke la obscenaĵoj troveblas en la literaturo, sur la strato aŭ en la lito...

Ljubomir Trifonĉovski



GV : ĝenerala vortaro - normala vorto

Jar: ĵargono - pika vorto, kiu ne uzindas en pruda konversacio

Neo: neologismo - proponita vorto far aŭtoro, apenaŭ uzata

Mit: mitologio

Sci: scienca - faka (ofte medicina) vorto

* : verbo netransitiva

=> : verbo transitiva

□ : vidu (en la okazo, ke la vorto estas lingve malrekomendata)

Kp : komparu

pp : parolante pri

VORTARO

Adulti (GV, *) sekse malfideli, trompi (Kp: kokri)

Sangadulto incesto

Viradulto 1. sodomio. 2. pederastio

Afodio (Sci) skarabo, kiu vivas en fekaĵoj

Afrodizio (Sci) eksciteco de la seksorganoj

Afrodiziaĵo afrodizianta substanco

Malafrodizio pli-malpli kompleta manko de seksa ekscitiĝo

Agapo (Neo) amfesteno, komunua festo

Ajdeso → ajdoso

Ajdoso (GV) moderna venusa plago

Ajdosoo → ajdoso

Amori (GV, *) sekse ami

Anafrodizio (Neo) malafrodizio

Androgino (Sci) duseksulo (ankaŭ: hermafrodito)

Anuso (GV) trafekejo

Ascendi (Jar, =>) supreniri (ankaŭ iun)

Bakanalo (GV) bakĥanalia, orgio

Bakĥanalia (Mit) orgia festo de Bakĥo en Romo; tumulta orgio

Bakĥantino (Mit) adorantiono posedata de Bakĥo en ties orgia kulto

Balano (Sci) glano

Bibio (Sci) muŝo, kiu infestas ekskrementon

Biseksa (Neo)	ambaŭseksa
Blenoragio (Sci)	inflamo de viraj aŭ inaj generiloj
Blenoreo (Sci)	kronika blenoragio (= vezika kataro)
Bordelo (GV)	amordomo
Bordelista	posedanto de bordelo
Bugri (Jar, =>)	anuskoiti (ankaŭ: sodomii)
Buĥto (Jar)	virina vulvo
Buŝino (Neo)	virina vulvo
Cico (GV)	mampinto
Cirkumcidi (Sci, =>)	detranĉe liberigi la glanon
Ĉasta (GV)	detenanta sin de seksrilatoj, evitanta volupton
Ĉiĉo (Neo)	1. virino. 2. virina vulvo
Ĉjo-knabino (Jar)	vireca samseksemulino
Ĉuro (Jar)	spermo
Ĉuri (Jar, *)	orgasmi (ĉe la viro)
Defeki (Sci, *)	→ feki
Deflori (Jar, =>)	senvirgigi
Diareo (Sci)	oftaj kaj likvaj fekoj (Kp: lakso)
Ejakuli (Sci, *)	spermĵeti
Ejakulacii	→ ejakuli
Eksciti (GV, =>)	fari tre intensa la funkcion de korpa organo aŭ senso
Ekscizi (Sci, =>)	forigi per tranĉa instrumento
Ekshibicio (Sci)	obsedo senpudore elmontri seksorganojn
Ekzibi (Jar, *)	ekshibicii

Ekskremento (Sci) substanco forkondukita de la organismo (urino, ŝvito kaj ĉefe fekaĵo)

Erekti (Sci, =>) pligrandigi kaj rigidigi

Eretismo (Sci) eksciteco de organo

Eroto (GV) seksa impulso

Erotogena kapabla estigi erotajn sencajojn

Erotismo ekscesa aŭ patologia emo al seksaj aferoj

Erotologio scienca studo pri la eroto aŭ perversioj

Erotomanio erota obsedo

Erotika (GV) esprimanta aŭ alvokanta seksan volupton

Erótico la amora arto

Eŭnuko (GV) kastrita viro

Faluso (Jar) servopreta kaco

Feki (GV, *) ekskrementi (ankaŭ: kaki, merdi)

Ferdo (Neo) vidu: ferdinando

Ferdinando (Neo) familiara nomo de la penisino (ankaŭ: ferdo, francisko)

Fetiĉismo (Sci) voluptodona altiriĝo al vestaĵoj aŭ aliaj objektoj

Fiki (Jar, =>) sekskuniĝi (vidu la soneton XXXV)

Fimozo (Sci) mallarĝeco de la prepucia ringo

Flatulenco (Sci) akumuligo de gasoj precipe en la stomako kaj intesto

Fluti (Jar, =>) midzi

Forniki (Neo, =>) malĉaste ami, malĉaste seksumi

Fotri (Neo, =>) koiti (pp maskloj)

Francisko (Neo) familiara nomo de la vira penisino (ankaŭ: ferdo, ferdinando)

Frandzi → franzi
 Franzi (Jar, =>) piĉleki (Kp: midzi, sesdeknaŭi)
 Frigida (Sci) sekse inerta, malafrodizia (Kp: impotenta)
 Ftiro (Sci) pubpediko
 Ftirio → ftiro
 Furzo (GV) anusa eligo de haladzo
 Gadmeso (Neo) artefarita penisino
 Garzono (Neo) njo-knabo
 Gejo (Jar) samseksemulo
 Gejŝo (GV) eleganta plezurodonantino en Japanio
 Geŝo → gejŝo
 Generi (GV, =>) fiki, sed efike
 Glano (Jar) peniskapo
 Gluteo (GV) sidvango
 Gonokoko (Sci) mikrobo kaŭzanta blenoragion
 Gruva (Neo) amor-veka
 Ĝigolo (Neo) juna amisto, vivtenata de pli maljuna virino
 Havi (Jar, =>) fiki, koni, posedi
 Hermafrodito (Sci) duseksulo (ankaŭ: androgino)
 Hetajro (Neo) helena kulturita kaj altsocieta prostituitino
 Himeno (Sci) karnoprotektilo ĉe virgulinoj
 Homoseksuala → samseksama
 Impotenta (Sci) sekse nekapabla (Kp: frigida)
 Incesto (GV) seksrilatoj inter proksimaj samfamilianoj (ankaŭ: sangadulto)

Ingveno (GV)	korpoparto inter la subventro kaj la femuro
Inkubo (Mit) (Kp: sukubo)	diablo, kiu alprenis formon de viri por kuniĝi kun virino
Inocenta (Neo)	puranima, nekonscia pri ekzisto de fimoralo
Insemi (Neo, =>)	fekundigi, ensemi
Insinui (Neo, =>)	milde, preskaŭ nerimarkeble enŝovi
Intumeski (Neo, *)	ekŝveli
Jonio (Mit)	piĉo, kiel objekto de kulto ĉe la hinduoj
Kaco (Jar)	peniso
Kacingo	kondomo
Kacujo	pantalonfendo
Kaki (Jar, *)	feki
Kakaceto (Neo)	infana kaco
Kastri (GV, =>)	senigi je generivo
Klimakso (GV)	plej supra punkto, apogeo (Kp: orgasmo)
Klimaktero (Sci)	malfacila periodo de la virina vivo, komenciĝanta post la menopaŭzo
Klistero (Sci)	enigo de likvaĵo tra la anuso por faciligi la defekon aŭ por nutri
Klirtoro (Sci)	ina erektiĝema organo ĉe la vulvo
Klozeto (GV)	necesejo kun akvoŝpruco (Kp: latrino)
Koiti (GV, *)	sekskuniĝi
Kojono (Jar)	ĉurovo, testiko
Kokri (Jar, =>)	adulti
Koni (Jar, =>)	sekse koni
Koncepcii (Neo, *)	gravediĝi senmakule

Koncipi (Neo, =>) gravedigi (Kp: generi)

Kondomo (GV) kontraŭgenera aŭ -kontaĝa kackapuĉo (ankaŭ: kacingo, penisingo)

Kondono → kondomo

Konkubi (GV, *) vivi kune sed ne geedzigitaj (pp viro kaj virino)

Konstipo (GV) mallakso

Kontracepcio (Neo) metodo celanta laŭvolan nefekundecon

Kontracipa (Neo) malhelpanta la koncipiĝon

Kopuli (Sci, *) koiti

Kopulacii → kopuli

Kundo (Neo) vulvo

Kurtizano (Neo) virino malmorale kondukanta, sed klera kaj sprita

Kuŝi (Neo, *) sekskuniĝi en horizontala pozicio

Lakso (Sci) laksiga malforteco de la intestoj

Laksi (GV, *) likve merdi (Kp: diareo)

Langumi (Jar, =>) leki ies seksorganojn

Lasciva (GV) voluptama

Latrino (GV) necesejo sen akvoŝpruco (Kp: klozeto)

Lesbo (Jar) samseksemulino

Lesbanino → lesbo

Libido (Sci) seksimpulso

Lingamo (Mit) penis, kiel objekto de kulto ĉe la hinduoj

Lipoj (Jar) moveblaj karnorandoj de la piĉaperturo

Lubriki (GV, =>) meti substancon speciale glitemigan sur

Frotanta surfaco por faciligi la glitadon

Lueso (Neo)	sifiliso
Lupanaro (Neo)	publikulinejo
Mamo (GV)	elstara parto de la brusto
Maritorno (Neo)	malbela, malpura virino
Masoĥismo (Jar)	volupto el kruelaĵoj trudataj de amat(in)o
Masoĥisto (Jar)	masoĥismulo
Masturbi (GV, =>)	seksvolupti sola
Meleno (Sci)	anusa eliro de nigra sango
Melki (Jar, =>)	eltiri la lakton el viro
Menado (Mit)	freneziĝe ekscitita bakĥanino
Menopaŭzo (Sci)	fino de la menstruo funkcio
Menstruo (GV)	monata sangelfluo ĉe virinoj (ankaŭ: monataĵo)
Merdo (Jar)	fekaĵo
Meretrico (Neo)	romia prostituitino
Merkino (Neo)	artefarita piĉo
Midzi (Jar, =>)	penissuĉi, buŝkoiti, fluti (Kp: franzi, sesdeknaŭi)
Nano (Neo)	vira organo
Nato (Neo)	gluteo, sidvango
Necesejo (GV)	ejo por feki kaj urini
Necesabo (Neo)	tie, kie oni sidas por feki, fekpelvo
Nekrofilio (Sci)	perversa emo al sekskuniĝo kun kadavroj
Nimfo (Sci)	vulva lipeto
Nimfomanio	virina afrodizio (Kp: satiriazio)
Njo-knabo (Jar)	ineca virsamseksemulo

Notora (Neo)	konata (kun aĉa nuanco)
Nupto (Neo)	geedziĝo, seksa pariĝo
Oaristo (Neo)	poemo de ama interparolo
Obscena (GV)	krude ofendanta la pudoron
Onani (Sci, =>)	masturbi
Onanismo (Sci)	memerotismo
Organo (Jar)	seksorgano
Orgasmo (GV)	amvolupt-kulmino (Kp: ĉuri)
Orgio (GV)	manĝa, drinka aŭ seksa dibiĉo
Orificio (Neo)	enira aŭ elira aperturo
Oskuli (Neo, *)	kun(kisi)
Ovo (Jar)	testiko, kojono
Ovoido (Sci)	globoforma medikamentaĵo, enmetota en la vaginon (Kp: supozitorio)
Palpi (Jar, =>)	karesi per manoj
Pandaro (Neo)	homo, kiu aranĝas por aliaj sekretajn amaferojn
Pederasto (Jar)	pederastiulo
Pederastio (GV)	1. seksinklino al junaj knaboj. 2. samseksamo (malŝate)
Pejorativa (Neo)	havanta tendencon fiigi (aŭ -iĝi), aĉigi (aŭ -iĝi)
Peniso (GV)	vira seksorgano
Perineo (Sci)	korpoparto inter la anuso kaj la skroto aŭ la vulvo
Perversio (Sci)	devio de la seksa instinkto
Piĉo (Jar)	vulvo
Piĉjo	→ piĉo

Pinupulino (Neo) spice alloga belulino
Pipiĉeto (Neo) infana piĉo
Pipinjo (Neo) piĉo (karese)
Pisi (GV, *) urini
Poluo (Neo) polucio
Porna (Jar) pornografia
Pornografia (GV) pritraktanta malĉastajn temojn
Posedi (Jar, =>) fiki, havi, koni
Pranci (Neo, *) stariĝi (pp kaco)
Prepucio (Sci) haŭto, falde ĉirkaŭanta la glanon
Priapo (Mit) greka dio de la fekundeco, prezentita kun grandega peniso
Priapismo (Sci) forta kaj dolora penis-erektiĝo
Prostitui (GV, =>) vendi sekson
Prostitucio → prostituado
Pruda (GV) ĉasta
Puo (Neo) furzo (vidu la soneton XXXII)
Pubo (GV) harkovrita parto de la ingveno
Pucelo (Neo) (juna) virgulino
Pudendo (Sci) korpoparto inter la pubo kaj la anuso
Pudoro (GV) kaŝemo de seksaj aferoj
Pugo (Jar) postaĵo
Puto (Jar) viro, kiu sin prostituas; vira putino
Putino (Jar) prostituitino, ĉiesulino
Rakahuto (Neo) speco de nutra fekulo

Retikulo (Neo) skroto
 Rufiano (Neo) diboĉulo
 Sadismo (Jar) volupto el vidado aŭ farado de kruelaĵoj
 Sadisto (Jar) sadismulo
 Sadomasoĥismo (Jar) kuvoluptado de sadisto kaj masoĥisto
 Safismo (Sci) virina seksimpulso al alia virino
 Safismulino lesbo
 Satiro (Neo) satiruso
 Satirio (Neo) satiruso
 Satiriazio (Sci) vira afrodizio (Kp: nimfomanio)
 Satiriozo (Neo) satiriazio
 Satiruso (Neo) homo cinike voluptama
 Sekso (GV) 1. seksorgano. 2. seksumo
 Seksumi (Jar, *) amori
 Semo (GV) ĉuro
 Sesdeknaŭi (Jar, *) buŝa interlekado aŭ seĉado de la seksorganoj (Kp: franzi, midzi)
 Sifilo (Neo) sifiliso
 Sifiliso (Sci) kontaĝa venusa malsano
 Sino (GV) oportuna korpoparto por sursidi
 Skopofilio (Sci) anstataŭigado de seksaj rilatoj per ilia
 Rigardado (Kp: vuajerismo)
 Skoptofilio → skopofilio
 Skroto (Sci) kojonoĵo
 Sodomismo (GV) sodomio

Sodomio (GV)	vira sekimpulso al alia viro
Sodomii (GV, *)	bugri
Spermo (GV)	virlakto, ĉuro
Spozo (Neo)	viro edziĝonta aŭ ĵus edziĝinta
Sterko (GV)	brutaj ekskrementoĵoj, miksitaj kun pajlo por plibonigi la grundon
Stimuli (GV, =>)	plivigli la funkciadon de korpa organo
Stupro (Neo)	malvirgigo (Kp: deflori)
Suĉi (Jar, =>)	suĉi ies penison, midzi (Kp: franzi)
Suĉumi (=>)	suĉi
Suko (Jar)	fluidaĵo el vagino
Sukubo (Mit)	diablo, kiu alprenis formon de virini por kuniĝi kun viro
Supozitorio (Sci)	medikamentaĵo, metata en la anuson por faciligi la defekon
Ŝaperono (Neo)	akompananto de gejunuloj por certigi ĉastan konduton
Tabuo (GV)	moro, laŭ kiu iuj aferoj estas nefareblaj
Testiko (Sci)	ĉurovo
Tremp(ad)i (GV, =>)	(longatempe aŭ ripete) malsekigi en likvaĵo
Trepidi (GV, *)	tremi laŭ etaj skuoj
Tohuvabohuo (Neo)	ĥaosa malordo, kiel en la Esperanta vortaro
Tribadismo (Sci)	safismo
Uk (Neo)	sufikso por kastrita besto
Urino (GV)	pisajaĵo
Uroĉo (Neo)	virina mammo konsiderata kiel bela objekto
Uŝi (Neo, =>)	orelfiki

Vagino (Sci)	kanalo inter la utero kaj la vulvo
Vampo (Neo)	seksalloga virino, kiu ekspluatas la virojn
Venera (Sci)	venusa (pri malsanoj)
Venerea → venera	
Venusa	malsano (GV) malsano sekse transdonebla
Violenti (Neo, =>)	perforti, seksatenci
Virga (GV)	ankoraŭ ne fiki(n)ta, ne stuprita
Volupto (Sci)	seksardo
Vuajerismo (Jar)	skopofilio
Vukro (Jar)	merdo
Vulvo (Sci)	virina seksorgano
Zigoto (Sci)	fekundigita ovocelo en la utero
Zizinjo (Neo)	kaco (karese)
Zoofilio (Sci)	seksimpulso al bestoj

SINONIMOJ KAJ METAFOROJ

FIKI altrui, ascendi, ĉur(um)i, geagadi, gedormi, gekuŝi, halebardi, kacumi,

kopuli, (fi-)petoli, piĉumi, plugi, rajdi, ŝraŭbi, truŝtopi, umi, fumi, geumi, gebani, geduŝi, gesidi, gestari, getabli ktp.

KACO amkompaso, amorilo, aspergilo, banano, bastono, borilo, bormaŝino, bubo, ĉjo-ilo, dusilabo, fadeno (nerigida), fikilo, firsto, fluto, fosto, fripono, generilo, glavo, gnomo, idigilo, ilo, infano mia, interkruraĵo, kapsiko, karna ostoj, karoto, kejlo, klabo, knabo mia, kojno, kolbaso,

kolono, koro, kreskanto, kreskant-en-mano, kreskant-en-amo, kukumo, kukurbo, lanco, lingamo, lorno, maĉeto, malgranda frato mia, malpiĉo, masto, meĉo, meza genuo, midzumino, najlo, paliso, pendaĵo, periskopo, pipo, pisilo, pistolo, piŝto, pivoto, pord-fosto, priapo, puba histo, revolvero, sabro, sceptro, serpento, stalagmito(rigida), stalaktito (nerigida), stango, stulta kapo stumpo, suĉumino, ŝtipo, ŝtopilo, pranca ŝvelo, tenilo, timono, torpedo, trabo, tria kruro, tubo, vergo, vira plio, vira vosto, viraĵo, virilo, vosto, 11-a fingro

MASTURBI fingrumi, kontentigi sin, permani, melki, tubsvingi

PIĈO amputo, buduaro, fendo, fendita bulko, groto, et-groto, inejo, ingo, interkruraĵo, malkaco, kanalo, karna valo, kaverno, nesto, ringo, amringeto, tiglo, truo, truino, ĉielvestiblo, plej sekreta centro, malsupra pordo

PROSTITUITO amdonisto, amorvendisto, malĉastulo, ĉiesulo, fikisto, plezursinjoro, plezurdonisto, publikulo, stratulo, sinvendisto

Nur ine: hetajro, kurtizano, meretrico, plezurdamo, putino

SLANGAĴOJ KAJ VORTLUDOJ

amo/mamo

ĉaro/ĉuro

disvolviĝi/disvulviĝi

elekti/erekti

envagoniĝi/envaginiĝi

faka/feka/fika

ge-/gej- (gesinjoroj/gejsinjoroj)

giĉeto/piĉeto

gravas/gravedas

junio/jonio

kaĉo/kaco

klubo/klabo

kun domo/kondomo

laca/laksa

legi/leki

mano/mamo

manpremi/mampremi

mastro/kastro

neĉesejo/necesejo

necesas/necesejas

paco/kaco

pensi/penisi

pensulo/pensiulo/penisulo

plano/glano

rubriko/lubriko

sesa/seksa

sperto/spermo

volapukisto/voplapugisto

"ni iru la vojon celitan"/ni iru la vojon ĉe-litan

altruismo/al-tru-ismo

amputo/am-puto
amuzi/am-uzi
deflori/de-flori
efiki/E-fiki
fi-katoj/fik-atoj
fi-kantoj/fik-antoj
fi-kuloj/fik-uloj
influo/in-fluo
informo/in-formo
insigno/in-signo
intimo/in-timo
karnavalo/karna valo
litografo/lito-grafo
menstruo/mens-truo
perversa/per-versa
trafiko/tra-fiko

ESPRIMOJ KAJ SAKROJ

Akvo pura - kaco dura
Aktoj de la Akademio!
Ĉie paco, krom en la kaco
Damnita sterko!
Diofeka furzo!
Ek al fek!

Fak-delegito (evite por fekaĵo)

Fikfek!

Fundamenta Kreatomatio!

Kacĵo (stulta ago)

Kace (malbone)

Kojon-hava (kuraĝa, lerta, kapabla)

Malliga la zonon de virgulino (senvirgigi)

Matene ludas tenison, vespere - penison.

Merdo!

Navigi per vaporo aŭ velo (esti biseksa)

Putina madono!

Sankta putinido!

Senkacula mondo!

Sterkejo (malbelaĉa loko)

Triagrada (insulta adjektivo pro malalta nivelo de io aŭ iu)

INSULTOJ

Azeno bugru vin!

Animo de eluzita ĉiesulino

Estu fikota!

Etingulino (prudulino)

Falokrato

Fekero

Fekfikanto

Fek-lekulo
Fekulo
Fik-klaŭno
Fridpisulo (impotentulo, frigidulo)
Furzulo
Fuŝ-azeno
Fuŝnaskito
Kac-suĉulo
Kojon-rompanto (ĝeniulo)
Masturbemulo
Merdulo
Midzanto
Muŝ-bugrulo (pedantulo aŭ prudulo)
Patrin-bugristo
Patrin-fikanto
Patrin-fikulo
Pornulo
Pug-fikanto
Pug-fikita
Pug-lekanto
Pug-mieno (malsimpatiulo)
Putinido
Senkojonulo (malkapablulo)
Senkaculo (malkapablulo)

Sodomiisto

Volapugisto

INVITAĈOJ POR FORIRI

Bugren!

Feken!

Forfiku!

Forfikiĝu!

Forfurzu!

Forpisu!

Iru feki!

Iru fiki!

Iru nombri viajn kojonojn!

Kacen!

Piĉen!

Putru for!

ESPRIMOJ PER MAL

Malfeki manĝi

Malmanĝi feki, vomi

Malnecesejo manĝejo

Malrestoracio necesejo

Malpisi trinki

Maltrinki pisi

Malpugo vizaĝo

Malvizaĝo pugo

PIKA POEZIO

XXXV

Por la unua dolĉa foj': deflori,
kaj poste: nupti, karnon miksi, trui
seksumi, kaj koiti, kaj geĝui,
kopuli, kohabiti kaj amori.

Enpafi, ŝtopi, vosti, grotesplori,
palisi kaj bambui kaj geglui,
kunkuŝi, kaj interne intervjui,
bombardi sube, mini, lanci, bori.

Kaj broson brosi, glavon karnan ingi,
buteron kirli, sondi, piŝti, piki,
kamenbalai, inan ingon klingi,

surpingli, karnon planti, truon fliki,
la brulon per la akvotu' estingi,
tranajli, spili, ŝargi, farĉi, fiki.

(Peter Peneter, Sekretaj sonetoj)

XXXII

Okazis foje al vi, mia Kara,
ke ĉe l'kulmina punkto de l' plezur'
eksplodo eta sonis kun murmur',
aŭdebla ankaŭ per la senso flara.

Necesas por ĉi son' familiara,
sonanta jen en molo, en en dur',
agrabla vorto, ĉar ekzistas nur
la "furzo", sed ĝi estas tro vulgara.

Eĉ se koleros la Akademi',
mi kreos novan vorton por ĉi-bruo,
kaj, ĉar ne estas ĝi soprana kri',

sed bariton', aŭ bas', laŭ la menuo,
mi onomatopee baptos ĝin ĝin
facile, lude kaj petole: puo.

(Peter Peneter, Sekretaj sonetoj)

tradicia skolta kanto

En Kerimjur' okazis bal'

La bal' de Kerimjur',

Kaj venis el al tuta lando

Damoj de plezur'.

Ho, kiu faros tuje.

Kiu faris jam?

Kaj se vi jam ĝin faris,

Logas vin la sam'.

Dudek virgulinoj

Alvenis laŭ konven'

Kaj post la balfiniĝo jam

Foriris sen himen'.

Ĉeestis pastredzino,

Kaj multaj laŭ bontrov'

Fikadis ŝin deposte laŭ

Kutimo de virbov'.

La ĉeestanta bienul'

Ekploris pro ĉagren',
Ĉar en la kampoj pro l' fikad'
Platiĝis lia gren'.

Fikado en la fojno,
Fikado sur matrac' -
Muziko ne aŭdeblis pro l'
Siblado de la kac'.

Fikado per la lango,
Fikado per la naz' -
Muziko ne aŭdeblis pro
La ĝemoj de l' ekstaz'.

Timante sifilison,
Poŝtist' por sia ĝu'
Preferis sin masturbi per
La porda letertru'.

Kojonojn el latuno
Akiris la eĉnuk'.
Sed kiam ajn li furzis, li
Fajreris ĉe la pug'.

Gimnastino venis,
Salutis ŝin aklam'
Ŝi supren-suben saltis sur
Risorto de la mam'.

La instruistedzino
Sidas en feliĉ'
Kun rozgirlando sur la kap',
Karoto en la piĉ'.

Lamul' ne povas fiki,
Sed lerte la fripon'
Servadis al la knabinar'
Per pinto de l' baston'.

Edzino al la edzo
Klarigis ĵus kaj plus,
Ke al l' uter' kondukas la
Vagino, ne l' anus'.

Plej malĝentolos Toĉjo:
Post kvardekfoja fik'
Dam' hejmeniris sola, dum
Li iris kun amik'.

Kaj post la balfiniĝo

Jen laŭdoj en kaskad':

Bonegis la muziko, sed

Plibonis la fikad'!

(tradukis W. Auld, La Kancerkliniko)

Ĉu ci ĉurumi celas

kun mi, la mildul'?

Ĉu ci pensas:

"ludilul' li estas?"

Ĉu? - iru fikfeki aliul'

Fi!

(A.T., Kata Luno)

Ho mia kac', stariĝu maltrankvile,

el pantalono vi eliru for!

Jam teni vin ne povas mi facile -

ekscitas vin la kor'!

Ho mia kac'! Post longa koitado

ne lasu min en la decida hor'!

Ne ĉesu! Daŭrigu ĝojigadon

de la virina kor'!

(K.V., Kata Luno)

Mi ĉiam rigardas kaj miras

La korpon perfektan admiras

La serc' de l' plezuro

Ne estas teruro

De mi ĉiu sens' vin deziras

Novparo fikadu sen laco

Kaj kiso kaj leko eĉ ŝmaco

Signalas feloĉon

Deziru li piĉon

Ne miru virino ĉe l' kaco

Ne revu vi edz' pri fidelo

Ne drinku sen ĉes' el botelo

Nur ĉastas malbela
Ŝin gardu en ĉelo
Aŭ plu ebriiĝu en kelo

Pasadis semajn' sen amoro
Ne eblas atend' dum eĉ horo
Ne plu via koro
Ne plu bela floro
Plenigu vin mia likvoro

Kokin' edziniĝas al koko
Aŭdiĝas de l' klik' granda moko
Aperas tuj ido
Subskrib' de l' perfido
Edz' kokru, ne iru kun froko

Bebeto manĝadas de l' mammo
Ciceton li prenas kun amo
Patrino belegas
Plu patro ne legas
Li ankaŭ suĉemas de l' damo

(H.A.F., Kata Luno)